

194

STIFARIO

### El la enhavo:

Mortis Jiří Karen  
kaj Vladimír Váňa  
90 jaroj de Kurisu Kei  
Aliĝilo al la konferenco  
Dombestaj parazititoj  
Ni kreu grandan vortaron  
Lingvaj ludoj kaj enigmoj  
E-mental'  
SUS en Hradec Králové



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**Jiří Karen**

(11. 6. 1920 - 30. 6. 2000)

kun la edzino Zuzka kaj amikino Margit

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 6-foje jare. Abono 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)  
**rete:** starto@clavis.cz, www.clavis.cz/starto  
**ĈEA:** cea@tnet.cz, www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membroklotizoj:** A 200 Kč, B 100 Kč, D 50 Kč, E 50 Kč, F 4000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 490 Kč komencantoj, 450 Kč progresintoj. Aliĝoj: Esperanto, p.s. 1069, 111 21 Praha 1

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj

**Komisioj de ĈEA:** gazetara-informa, ekzamena

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:** 3330-021/0100, Komerční banka, Praha 2

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidantino:** Věra Podhradská, Pořfčí 1, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047 (eksteraj rilatoj, honoraj membroj, E-muzeo)

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso 02.9912126 (eldonado, UEA, subvencioj)

**Vicprezidanto:** Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11 Netolice (sekcioj)

**Sekretariino:** Květa Krajíčková, Espe-

ranto, p.s. 1069, 111 21 Praha 1 (kontado, membrobazo)

**Kasisto:** Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha (konferencoj, seminarioj)

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na nábreží 45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253 (ĜK, kulturo)

**Komitatano:** Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší (protokolado, junulara sekcio, ĉefdelegito de UEA)

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, Libuše Krejčí, Školní 693, 789 61 Bludov

**Ĉefdelegito de UEA:** Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj)

**Lingva kontrolo de ĉi tiu numero:** Miloslav Pastrňák, Věra Podhradská

**Esperanto-muzeo:** Jiří Pištor, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová

**Abonoj de gazetoj:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, elektronika poŝto: vlada\_hasala@iol.cz

*Amikeca Reto (FR, 105 Kč), El Popola Ĉinio (CN, 584), Esperantisto Slovaka (SK, 200), Eventoj (HU, 668), Heroldo (CH, 540), Informilo de AEH (CZ, 100), Interligilo de IPETA (BG, 110), Juna Amiko (HU, 130), Komencanto (RU, 409), Kosmos (DK, 204), La Gazeto (FR, 550), La Kancerkliniko (FR, 443), La merkato de IKEF (BE, 376), La Migranto (NL, 90), La Ondo de Esperanto (RU, 542), La Verda Lupeo de ELF (DE, 392), Literatura Foiro (CH, 505), Litova Stelo (LT, 362), Monato (BE, 561), La Jaro (BE, 164), Monda Solidareco (FR, 171), Ondo da Vero (TG, 555), Oomoto (JP, 250), OSIEK (135), Penseo (CN, libervola), RET-Info (HU, 429), Scienco kaj kulturo (RU, 455), Sennaciulo de SAT (FR, 530).*

ISSN 1212-009X

## Forlasis nin poeto Jiří Karen

Dimanĉe la 30-an de aprilo mortis post longa malsano poeto Jiří Karen (propranome Ladislav Podmele). Marde la 9-an de majo adiaŭis lin la nombra komunumo de liaj amikoj kaj legantoj en la praga krematorio, kie prezentis la funebran parolon d-ro Pavelka, kritikisto el Brno. Tiu memorigis, ke ĝuste aperas en lia aranĝo kaj en lia eldonejo Georgetown en Brno germanlingva elekto el la poezio de Karen en traduko de Jan Kühmeier sub titolo *Ein kleines Licht im Dunkeln* (Eta lumo en tenebroj), kiu jam la aŭtoron ne povis plezurigi. Samtempe la praga eldonejo Chronos eldonis la lastan ĉeĥlingvan poemaron de Karen, nomita *Výpravy Dona Quijota do hlubin lidské duše* (Ekspedicioj de Don Quijote en la profundaĵojn de la homa animo). La libro estis donacita al ĉeestantoj de la aŭtora poezia vespero la 11-an de majo, planita omaĝe al lia junia 80-jariĝo. Tiun li ne ĝisvivis, nur kelkaj semajnoj mankis.

Pro granda nombro da funebrantoj estis la ceremonio translokita al la moderne ekipita preĝejo de la Eklezio Ĉeĥoslovaka Husana, improvize adaptita al deklamado de poezio, kiun sukcese plenumis Rudolf Pellar kaj Táňa Fischerová. La enkondukan paroladon por prezenti la novan libron de Jiří Karen havis la eldonistino d-ino Věra Ludíková el la eldonejo Chronos. En la libro kun ilustra akompano fare de Karel Oberthor estas indikite, ke ĝi aperas okaze de la jarmilaŝanĝo 2000 kaj omaĝe al la 80-jariĝo de la aŭtoro. Konatigo de la nova

poemaro al la publiko impresis en la nekutima medio efike kaj persiste, tiom pli, ke ĝi estis aŭtora mesaĝo postmorta. La ceremonio realiĝis dank' al organizinto Martin Chadima.

Jiří Karen naskiĝis la 11-an de junio 1920 en Litomyšl. Li lernis metion de librovendisto en Vysoké Mýto kaj studis en klasika gimnazio en Hradec Králové. Dum la okupacio li estis komande laborigita en Magdeburgo kaj Nordhausen. Post la milito li studis la filozofian fakultaton en Karola Universitato. Komence li praktikis kiel edukisto de laborista junularo, poste kiel mezlerneja instruisto kaj laborulo de la praga Instituto por Plua Edukado de Instruistoj kaj de Esplor-Instituto de Faka Instruado. Liaj unuopaj poemoj kaj rakontoj aperadis dise tra ĉeĥa gazetaro jam sub plumnomo Jiří Karen, sub la propra nomo Ladislav Podmele li publikigis fakajn pedagogiajn verkojn, ekz. *Metodická příručka k dějinám starověku* (Metodika manlibro pri historio de la antikva epoko, 1955), *Pověrečné a naivní myšlení jako teoretický problém* (Superstiĉa kaj naiva pensado kiel teoria problemoj, 1969) k.a. En junula aĝo li entuziasmiĝis por okcidentalo, en la 70-aj jaroj li transiris al Esperanto.

Kiel aŭtoro de poemaroj li debutis per bibliofila presaĝo *Básně pro Violu* (Poemoj por Viola) nur en la jaro 1972. Sed poste sekvis pluraj libroj unu post la alia. Ankoraŭ samjare *Vteřiny zrání* (Sekundoj de maturiĝo), en 1973 *Okřídlený kámen* (Flugilhava ŝtono), kiun poste esperantigis Jiří Kořínek.

En 1976 eĉ du poemaroj, nome *Plášt' do deště* (Pluvmantelo) kaj *Den laskavý na slova* (Tago afabla je vortoj). Simile aperas du libroj en 1979: *Ještě jednou žít na zemi* (Ankoraŭ unufoje vivi sur la tero) kaj *Hledání modrého tónu* (Serĉado de la blua tono) omaĝe al F. Chopin. En 1980 estis eldonita poema komponaĵo en germanlingva traduko fare de Ludvík Kundera *Bevor die neunte Welle*, poste ankaŭ en esperantigo de Richard Schulz *Antaŭ la naŭa ondo* (1994). Pluaj poemaroj de Karen: *Země, po které jsem šel* (Tero, sur kiu mi iris, 1983), *Stromy přicházejí do města* (Arboj venas urben, 1984), esperantlingva elekto el *Flugilhava ŝtono* (1985), *Sázka na člověka* (Veto favore pri homo, 1986), *Vaše podlaha náš strop* (Via planko nia plafono, 1988), elekto el ama kaj familia liriko *Čtverec nad přeponou lásky* (Kvadrato super la hipotenuzo de la amo, 1989), *Skřivan zpívá na betonu* (Alaŭdo kantas surbetone, 1990), *Bud' rád, že nejsi kámen* (Ĝoju, ke vi ne estas ŝtono, 1994), elekto *Svět laskavý nejen na slova* (La mondo afabla ne nur je vortoj, 1996), *Potichu a šeptem* (Softe kaj flustre, 1998), multobligitaj tajpaĵoj *Neklidná zátíší. Pocta malířům mého srdce* (Malkvietaj mortaj naturoj. Omaĝo al pentristoj de mia koro, 1999) kaj esperantlingva *Kanto de vaganto sur planedo Ĝoja Ĝojmalo* (1999). Unu semajnon post lia forpaso aperis la jam menciita poemaro pri Don Quijote, intencata kiel omaĝo al lia junia 80-jariĝo, same kiel la ankaŭ jam aludita germana elekto el poezio de Karen. Dise

tra Esperanta gazetaro troveblas liaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj. En manuskriptoj atendas la rememoroj de Karen pri la infanaĝo kaj pri la jaroj de lernado kun travivaĵoj el la t.n. "Protektoriato" (germana okupacio de Ĉeĥoslovakio), plie multaj tajpitaj kajeroj de poezio ĝis nun ne publikigita.

La ĉeĥan literaturon li prezentis al la internacia publiko per siaj tradukoj, kiuj aperadis en la ĉeĥoslovakaj numeroj de Paco: *Ĉu mi estas bestio?* de Ota Dub (1982), *Pri la libereco* de Milan Jariš (1987), *La konfido perdita* de Jaroslav Čejka (1986) kaj samnumere *Sur la propra vojo* de František Kožík, kio estas fragmento el *Největší z pierotů* (La plej eminenta el pierotoj), biografia romano pri mimo Gasparo Deburau. La romanon Jiří Karen tradukis komplete (kun Josef Vondroušek), sed la manuskripto ankoraŭ ne estis eldonita. Sed en 1984 aperis antologieto el la verkoj de František Kožík en tradukoj de Jiří Karen sub titolo *Poeto ne mortas*. Pluajn verkojn el la plumo de Karen ankoraŭ necesos kolekti, inter ili ankaŭ la ĉeĥlingvaj en ĉeĥaj literaturaj revuoj, per kiuj li klopodis atentigi la ĉeĥajn aŭtorojn pri ekzisto de la internacia lingvo kaj pri ĝiaj literaturaj valoroj.

Jen respektoveka vico da libroj kaj ĉefe bela kaj originala atestaĵo pri nia vivo, pri ĝojoj kaj malĝojoj de ĉiu el ni. Kaj Esperanto helpis, ke la nomo de Jiří Karen penetru en la konscion de kulturamantoj en la tuta mondo.

Čestmír Vidman  
(kompletigis la red.)

## Jiří Karen

### Kiel folio mi turniĝas ĉirkaŭ mia akso

Ĉu vi venas morto? Iomete indulgu min  
Ankoraŭ mi ne vestis min konvene por  
vojaĝo

Nenion diru plu Mi scias, kio decas kaj  
konvenas

Mi iras jam Mi iras jam

Kaj vi tombo

amika lito pretigita

por eterna amorado

sub flaveta acero

alportu al mi trankvilon

Longe mi penis kutimiĝi al lam- kaj  
promenbastonoj

(por foriri digne de la scenejo)

Pri ĉerkoj kaj tombejoj mi instruiĝis

kaj pri tomboŝtonoj

loĝi sur la transa riverbordo

mi lernis

kaj tre pacience

Kiu mi estis Por kio mi vivis

vi trovos en mia verko

Vi aŭdos min en susurado de arbaro

Vi renkontos min en kampoj postvilaĝe

Sufiĉas bruligi kandelon

vi vidos min en ombro

(El poemaro "Ekspedicioj de Don Quijote  
en la profundaĵojn de la homa animo")

*(ambaŭ poemojn sur ĉi tiu paĝo  
esperantigis M. Malovec)*

## Za Jiřím Karenem

Odešel dokončit

sídlíštní dlažbu

Chyběla tam v rozdělané řadě

poslední kostka

Aby se nám dobře chodilo

po tom chvátajícím světě

který houževnatě dobýval

dláty slov

Z mlhy se dominanta zvedá

donkichotské postavy

A u ní jarně raší

snítka esperanta

4.5.2000

Ĉestmír Vidman



## Post Jiří Karen

Li foriris finmeti

la setlejan pavimon

Mankis tie en la

prilaborata vico

la lasta pavimero

Por ke ni facile paŝu

sur tiu ĉi hastema mondo

kiun li persistis konkeri

per ĉiziloj de vortoj

El nebulo leviĝas dominanto

de la donkiĥota figuro

Kaj ĉe ĝi printempe burĝonas

frondo de Esperanto

4.5.2000

Ĉestmír Vidman

*Post informo pri forpaso de Jiří Karen venis sciigo, ke jam en marto mortis alia talenta ĉeĥa literaturisto kaj filatelisto, Vladimír Vána el Plzeň. Li diligentis en anguleto, ekster nia kluba kaj asocia vivo, tial ni ne rimarkis lian foriron. Sed li postlasis verkon, kiu certigos al li gravan lokon inter la ĉeĥaj esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj.*

## Vladimír VÁŇA (17.2.1932-25.3.2000)

estas konata precipe el *Paŝoj al plena posedo* de W. Auld kiel aŭtoro de la plej komika rakonto *Kiel ni mortigadis leporon por la antaŭkristnaska vespermanĝo* (Paŝo 26). Li verkis ankaŭ aliajn rakontojn aprezitajn dum belartaj konkursoj (*Kiel mi eniris Parnason, Kisteho, Maljuna koro, Milita danco, La Fortuno, Kiel kondutas al ni kelkaj oficistoj, La konscienco*). Grava parto de lia verkaro estas tradukoj. En 1965 eldonis STAFETO lian tradukon de tragedia novelo *Romeo, Julieta kaj la tenebro* de Jan Otčenášek kun antaŭparolo de Luis Aragon, verkita por tiu ĉi Esperantlingva eldono (vidu PIV, p. 1099: "*Romeo, Julieta kaj la tenebro estas majstre tradukita*"). Sian talenton li elprovis ankaŭ ĉe la ĉefverko de Jaroslav Hašek *La aventuroj de la brava soldato Ŝvejek*, el kiu aperis publike nur la unua ĉapitro kaj la resto ankoraŭ atendas eldononton. Plie li tradukis plurajn rakontojn (Stefania Grodzieńska: *Elflugos la birdeto*; *Kiel ĉiam*; Jaroslav Hašek: *Kial Baci havis*

*haltigita la avancon*; *Kunveno de nia komunuma reprezentantaro en Mejdlovary*; Jiří Haussmann: *Danoj en Praha*; František Němec: *Alberto sur ĉrara vojo*; *Sinjoro Sanytr postulas sian subtason*; Eduard Petiška: *Prometeo*; Karel Poláček: *Joakimo kaj la paren caro*; *La kompensa komerco I*).

Kiel filatelisto li postlasis katalogojn kaj artikolojn *Statistiko de poŝtaj dokumentoj en kaj pri Esperanto* (1969), *Katalogo pri Esperanto-poŝtmarkoj* (1967), *Kiel krei filatelan ekspozicion je la temo Esperanto* (1977) kaj *Tutaĵoj je la temo Esperanto* (1986). Tutaĵoj estas kovertoj, kartleterojn, poŝtkartoj kaj aerogramoj kun enpresita poŝtmarko.

Mi bedaŭras, ke mi neniam vidis s-roon V. Váňa, ke mi konas nur lian voĉon pertelefone kaj liajn mesaĝojn per elektronika poŝto. Antaŭ du jaroj inĝ. Kočvara konfidis al mi manuskripton de la unua volumo de Ŝvejek en traduko de Váňa por enkomputiligado, kion mi plenumis kun s-ano Josef Mendl. La rezulton mi sendis al s-ro Váňa surdiskede kaj surpapere, kio lin tiel entuziasmigis, ke li baldaŭ tradukis la reston kaj komencis enkomputiligadi ankaŭ aliajn siajn verkojn literaturajn kaj filatelajn por registri ilin sur kompakta disko. Komence de la nuna jaro li rete sciigis, ke li forveturas por longa tempo al iu sanatorio. Poste mi kelkajn monatojn ne aŭdis pri li ĝis ŝoka informo pri lia morto, kiun konfirmis al mi la klubo en Plzeň.

Miroslav Malovec

## KAEST 2000

Kolokvo Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko okazos denove en Prago 2000-11-10/12. Super la kolokvo jam transprenis aŭspiciojn Universala Esperanto-Asocio.



Oni traktos en tri sekcioj:

**Ĉeftemo (Sekcio A):** Enonomio sojle al la tria jarmilo

**Tradiciaj temoj:**

**Sekcio B:** Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto

**Sekcio C:** Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko ĝenerale

La kolokvon aranĝos Ĉeĥa Esperanto-Asocio kunlabore kun kongresa agentejo KAVA-PECH kiel parton de la Kampanjo 2000.

Pliaj informoj kaj aliĝiloj disponeblas ĉe: KAVA-PECH, Petr Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobříchovice, tel.: 02.991 2201, fakso: 02.991 2126, retadreso: kaest@kava-pech.cz.

La 200-paĝa prelegkolekto de KAEST 98 sub la titolo de tiama ĉeftemo "Modernaj rimedoj de komunikado" kun resumoj en la angla, germana kaj ĉeĥa

lingvoj, aĉeteblas en la libroservo de ĈEA kontraŭ Kč 15,-.

**Aliĝiloj ĝis 31.7.2000!**

Pro Ĉeĥy a Slováky: vložné 250 Kč (programovú sešit i sborník přednášek)

13-a

## Internacia Kultura Festivalo

(29.9. - 1. 10. 2000 Ústí nad Labem)  
omaĝe al Jiří Kořínek kaj d-ro Tomáš Pumpr

Vendrede okazos en la restoracio LEV interkona vespero kun vespermaĝo kaj babilado. Sabato estos dediĉita al prelega kaj diskuta matineo, posttagmeza homaranisma spirita koncerto en "Ruĝa preĝejo" kaj al muzika, kanta kaj deklama vespero el la verkaro de Jiří Kořínek, Tomáš Pumpr kaj aliaj. Dimanĉe busa ekskurso al rokaro Tisá.

Al la prelega matineo jam aliĝis d-ro Petr Chrdle kun du prelegoj: E-agado de Stanjo, Pri 80-a jubileo de Husana eklezio. Aliaj prelegoj estas atendataj. Kiu rememoros niajn grandajn forpasintojn (Rumler, Bartovská, Váňa, Karen)? Sed kompreneble vi povas veni eĉ sen prelego.

Aliĝu ĉe: S-ro Miroslav Smyčka, Kojetická 90, 400 03 Ústí nad Labem, tel. 047/553 24 17.

*La tago de prelegoj kaj diskutoj*

## LA KREDO KAJ KRISTANISMO EN LA LANDOJ DE MEZA KAJ ORIENTA EŬROPO

okazinta la 20-an de majo 2000 en České Budějovice (vidu Starto 2/2000, p. 9).

La konferencon inaŭguris kuncelebrata meso en la klostra preĝejo de Sinofero de Virgulino Maria. Ĉe la altaro renkontiĝis tri pastroj - ĉeĥo, polo kaj hungaro. La mesaj tekstoj, parola vorto kaj famaj kantoj eksonis en Esperanto, oficiale agnoskita liturgia lingvo. Ĝi estis interesa travivaĵo por ĉeestantaj kredantoj, kiuj travivis internacian meson la unuan fojon.

La meson sekvis ciklo de prelegoj kaj diskutoj. La prelegantoj el kvar landoj priskribis situacion de iliaj kristanaj komunumoj antaŭ dek jaroj kaj nun. Al la prelegoj reagis demandoj. Ĉio estis tradukata en la ĉeĥan.

Unue parolis D-ro Gottfried Noske el Germanio pri la diferenca postmilita situacio en ambaŭ Germanuoj kaj pri nuntempaj problemoj post reunuiĝo. Pastro Lajos Kóbor el Hungario bildigis la saman periodon per travivaĵoj de konkretaj personoj, kiuj ofte similis al travivaĵoj de niaj religianoj.

Posttagmeze la kroata lektorino Maria Belošević prezentis la kristanan historion de sia lando, la sekvojn de la balkana milito ne nur en Kroatio, sed ankaŭ en la ceteraj landoj de la eksa Jugoslavio.

La grek-katolika pastro Serhij Prudko raportis pri situacio en Ukrainio, kie okazis kruelaj perzekutoj fare de la komunisma reĝimo kaj kie ĝis nun daŭras

komplikaj rilatoj inter la ortodoksaj kaj katolikaj kristanoj.

La katolika sekcio de ĈEA intencas eldoni dulingvan kolekton de la prelegoj.

*laŭ Ing. Jan Kalný*

## INFANA E-GRUPETO EN HUNGARIO

De la 9-a ĝis la 15-a de julio 2000 estis Ŝárka, Klárka kaj Ivetka el Česká Třebová kaj Terezka, Hanička kaj Gábi el Brandýs nad Orlicí en Hungario. Tiu ĉi E-infana grupeto apartenas al E-rondeto AMIKECO en Česká Třebová.

Invitis nin P. Lajos Kóbor, vicprezidanto de IKUE. Li loĝas en vilaĝo Peresztég.

Vendrede ni trarigardis la urbon Brno, sabate Vienon (precipe Prater) kaj vespere ni jam estis en Sopron kaj poste en Peresztég. Tie ni nin prezentis lunde. En preĝejo je la 10-a kun pantomimo kaj je la 15-a en kulturdomo kun dancoj, kutimoj, fabeloj, eĉ spickukoj. Vizitantinoj de mi petis recepton por baki la spickukon.

Dimanĉe ni preparis programon. Ni vizitis ankaŭ muzeon, kastelon kaj tombon de István Széchenyi en Nagycenk. Marde ni ekskursis al Győr kaj al monaĥejo Pannonhalma. Merkrede ni ĝistagmeze nin prezentis en lernejo en Sopron kaj posttagmeze ni vizitis ŝtonminejon kaj lagon por bani.

Ĵaŭde ni, bedaŭrinde, devis veturi jam hejmen.

*Zdenka Novotná*



## JUBILEOJ

85

Anna PICKOVÁ, Hlinsko v Čechách  
Alois ŠTEMBERA, Písek

80

Ing. Kurt JANČÍK, Ostrava-Zábřeh  
Hilda KORÍNKOVÁ, Ústí nad Labem  
Ing. Antonín KLADORUBA, Studénka  
Marie KAVANOVÁ, Vodňany  
František PATERA, Hořice v Podkr.  
Jarmila MATĚJKOVÁ, Plzeň  
JUDr. Milada MOCKOVÁ, Olomouc  
Anna SVOZILOVÁ, Brno 16  
Helena SVOBODOVÁ, Příbram  
VI.-Břez. Hory

75

Miloš HLAVÁČEK, Hradec Králové  
Karel JANDA, Kralupy n. Vlt. III  
Radomil MAUDR, Praha 4  
Stanislav ŠTEFAN, Kladno IV  
Helena ŠTRUNCOVÁ, Praha 10

70

Miroslav BAROŠ, Valašské Meziříčí  
Magdalena PELCOVÁ, Červený  
Kostelec

60

Zdeňka VÍTOVÁ, Tábor

50

Stanislav DROPPA, Šumperk-Radotín  
Jaroslava RADLEROVÁ, Prostějov  
Jan SIHELNÍK, Praha 5  
PhDr. Ivo ŽELEZNÝ, Praha 4-Háje

## KURISU KEI 90-jara

Pasintjare la japana bohemisto kaj esperantisto Kurisu Kei, honora membro de UEA, iĝis ankaŭ honora membro de ĈEA. Tute prave. Dum 50 jaroj li enjapanigas verkojn el la ĉeĥa lingvo, propagandas nian kulturon en Japanio kaj - per siaj eseoj pri la ĉeĥa literaturo aperintaj en E-gazetaro - ankaŭ en Esperantujo. Grave li levas la prestiĝon de Esperanto ĉe neesperantistaj rondoj, kiuj admiras lian traduk-laboron (ministerio de kulturo, ĉeĥaj-japanaj societoj). Aĝuloj memoras personajn renkontojn kun li dum liaj prelegoj pri Japanio en niaj kluboj, kiam li instruis la japanan lingvon ĉe la Karola Universitato.

Li japanigis verkojn de Ĉapek, Drda, Fučík, Havlíček Borovský, Hašek, Lustig, Němcová, Neruda, Nesvadba, Neumann, Seifert, Scheinpflugová, Weil kaj Wolker. Kelkajn el liaj japanaj tradukoj mi konservas hejme kiel rarajojn.

Se Esperanto donus al mi en mia vivo nenion krom mia dekkvinjara amikeca kunlaboro kun samideano Kurisu, mi bezonus nenion plu.

Ni eltrinku la pokalon honore al la junkora kaj junanima vigla japana amiko, kiu la 18-an de julio ĝisvivis la 90-jariĝon.

*Jaroslav Žák*

## NI KONDOLENCAS

\* En Semily forpasis s-ano **Radmil Stínil**, nask. 1924, dumviva membro de ĈEA.

\* En Brno mortis **Doc. RNDr. MVDr. H.c. Ing. Jaromír Šíkula, CSc.**, multjara pedagogo de Veterinara kaj Farmacia Universitato en Brno, membro de EK Brno, en sia 76-a naskiĝtago.

Esperanto-klubo Plzeň aranĝas por esperantistoj, E-favorantoj kaj turistoj jam la 9-an Refreŝigan Esperantistan Tendaron (RET), denove en vilaĝo

## NEKVASOVY

ĉe urbeto Nepomuk, distrikto Plzeň-sudo

La tendaro efektiviĝos de la 13-a (dimanĉo) ĝis la 23-a (merkredo) de aŭgusto 2000, t.e. dum 10 tagoj (eblas partopreni pli mallonge)

La pitoreska vilaĝo Nekvasovy situas sur fervojtrako Plzeň-České Budějovice (N-o 190) inter rapidstacioj Nepomuk kaj Pačejev (respektive Horažďovice). Ĉirkaŭaĵo estas senindustria, malproksime de ĉefaj aŭtostradoj, sekve pura kaj tenera. Loĝado en tranoktejo de Sporta klubo "TJ", 6-7-litaj ĉambroj, kuirejo, klubejo-manĝejo, komuna higiena ekipaĵo inkluzive de duŝiloj. Apude granda sportplaco kaj malgranda naĝejo.

Manĝadon certigos niaj klubaninoj-kuiristinoj minimume 3-foje tage, funkcios kluba vendejo de vafloj, sukeraĵoj, kafo, limonado, biero ktp. Programo de Refreŝiga Esperantista Tendaro:

- ekskursoj en ĉirkaŭaĵon (trajne, piede)
- konversaciaj rondetoj, lingvaj ludoj
- sportaj kaj amuzaj ludoj
- nedevisa lernado de Esperanto
- naĝado, sunbanado ktp.

Anticipaj prezoj:

10 tagoj 1400 Kč 1645 SK 75 DEM

1 tago 150 Kč 176 SK 8 DEM aŭ

ekvivalento

Kapacito nur por 15-20 personoj. Nepre

necesas sendi aliĝilon al:

S-ro Jiří Vomáčka  
prezidanto de Esperanto-klubo  
Koterovská 30  
301 41 Plzeň  
Ĉeĥio

## NI GRATULAS

Danuŝe Zemková kaj Josef Petera geedziĝis la 20-an de majo 2000 en Prago. Gratulon ni sendas al Hřebečská 2674/422, 272 01 Kladno.

## Adonanto, adonito

En 1995 (STARTO, 1, 13) mi atentigis, ke "la ĉarma orflava floro *Adonanthe vernalis* (ĉeĥe: *hlaváček jarní*) devus esperantiĝi kiel **adonanto**". *Adonis aestivalis* (ĉeĥe: *hlaváčkovec letní*) restas **adonido**. Diference de la printempe floranta pereno (staŭdo) adonanto, ĝi estas planto unujara (anuelo) kun floroj cinabre ruĝaj.

La modernan botanikan nomenklaturon devus respekti ankaŭ esperantistoj en la koncernaj, cetere tre interesaj, artikoloj (STARTO, 1998, 3, 9; 2000, 2, 5-6).

Fontoj:

*Kavka, J.* (1995): Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature (3).

- STARTO, 1, 12-14, Brno.

*Chrtěk, J. k.a.* (1988): *Květena České socialistické republiky. I.* - Academia. Praha.

*Dostál, J.* (1989): *Nová květena ČSSR, I.* - Academia. Praha.

J. Kavka

Josef Cink

## Lingvaj ludoj kaj enigmoj (2)

Solvoj de la enigmaj kolonoj el la antaŭa numero:

1. Vieno, elano, regno, droni, aveno, sveni, tenti, ebena, lando, orelo, VERDA STELO

2. kosmo, krano, kampo, krizo, kadro, kremo, kialo, kanto, krono, SAMIDEANO

Hodiaŭ ni provos solvi kaj krei pluan enskriban enigmon kun la nomo

### Anguleto

Kampetoj por enskribi literojn formas triangulon, kies linioj sinsekve mallongigas je unu kampeto. Ĉefa regulo estas, ke la esprimo en la linio horizontala devas esti la sama kiel en la linio vertikala. Tio faciligas la divenadon. Neniu kaŝaĵo ĉi tie ekzistas.

Pli diros la ekzemploj.

<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	koncize ekspliki DIFINI
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	ripete paŝadi IRADI
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	ago FARO
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	posteulo IDO
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	persona pronomo NI
<input type="checkbox"/>	infinitiva finaĵo I

<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	nobela domego
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	agema
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	herbebenaja
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	karakteriza modelo
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	unua virino
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	artikolo
<input type="checkbox"/>	substantiva finaĵo

Jen la taskoj por diveni:

3. <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	proksima parenco
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	haste
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	subita sinmonro
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	delokigi kun si
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	naskito
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	negacio
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	ringa litero

4. <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	senpene
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	montriĝi
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	ĉesi rezisti
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	paŝi
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	persona pronomo
<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	6-a litero de la alfabeto

Josef Cink

## PAROLIGA KURSO

se tentokrát uskuteční o víkendu počátkem prosince v Dobřichovicích a je určen pro všechny, kteří se chtějí rozmluvit v esperantu. Pokud vám esperantská konverzace činí potíže, jste tou osobou, pro kterou je kurs pořádán. Přihlaste se (případně žádejte bližší informace) u Mgr. Jany Melichářkové, 696 02 Ratíškovice 938.



Solvo: kastelo, aktiva, stepa, tipo, Eva, la, o.

## EKS-JUNULARO

EK Ostrava-Vítkovice kun EK Ostrava-Poruba kunvenigis la 27-an de majo 2000 iaman junularon el la 50-aj jaroj, por rememori la tempon, kiam malpermeso organizi junajn homojn ekster la kadro de Asocio de Socialisma Junularo vekis grandan entuziasmon, pri kiu atestas tiama junulara bulteno. Venis trideko da personoj el Benešev, Dětmárovice, Frýdek-Místek, Havřířov, Opava, Orlová, Ostrava kaj Přerov. Venontjare en majo volas transpreni la iniciaton EK Přerov, kiu disdonis sian novan varbilon, kaj organizi la renkonton tutŝtate.

## Nova klubejo EK Ostrava-Vítkovice

Per la kunveno de la eksjunularo la klubo oficiale inaŭguris sian novan klubejon en la strato Zengrova 71.

## Internacia Junulara Semajno

Inter la 27-a de julio kaj 2-a de aŭgusto 2000 okazos la 13-a Internacia Junulara Semajno (IJS) en la hungara urbo Nyíregyháza.

IJS havas sian unikan etoson, kiu elformiĝis dum pli ol unu jardeko de la historio de la aranĝo. IJS estas la plej populara somera renkontiĝo de la mez-eŭropaj junuloj. Vi devas mem sperti la tutsemajnan festivalon kun popularaj programoj kiel ekskursoj, kulturaj kaj

artaj ludoj, noktumado en urbo kaj en naturo, varia distra programo, ĉiunokta diskoteko - kaj plej grave: vera Esperanta etoso kun speciala hungara gastamo. Kelkaj allogaj programeroj: neforgesebla surpriza festo dum la tradicia balo; ekskurso al Tokaj, la plej fama vinregiono de Hungario, por vingustumado; vizito al unu el la famaj pomĝardenoj de la regiono, kie kreskas la plej bongustaj pomoj en Hungario.

Aliĝilo riceveblas je la sekva adreso: Hungara Esperanto-Junularo, HU-1675 Budapeŝt, pf. 87 aŭ en hejmpaĝo: <http://www.math.bme.hu/~hej/>

*Vera Acsádi*

## Kdo do ĉela mládeže?

I když je pravda, že mládež učící se anglicky nebo německy se obvykle neorganizuje (alespoň ne podle studovaného jazyka), u mladých esperantistů bývá určitá organizovanost zvykem, aby svou znalost mohli lépe využít při setkáních se svými zahraničními vrstevníky. Česká esperantská mládež bývala tradičně velmi aktivní, vždy je ovšem potřeba několik jedinců jako "motoru" těchto aktivit. Ti z posledního desetiletí již odrůstají mládežnickému věku, takže nastává otázka, zda se iniciativy chopí někdo z vás, kteří jste naopak odrostli dětským létům. Pokud máte chuť pracovat, ozvěte se na adresu:

Lucie Karešová, Tylova 1262,  
508 01 Hořice v Podkrkonoší

## Pozvánka na 7. konferenci Českého esperantského svazu

Vážení přátelé,

výbor Českého esperantského svazu (dále jen ČES) v souladu se stanovami svolává 7. konferenci ČES na dny **13.-15. října 2000**.

Místem konání je Střední odborné učiliště zemědělské (dále jen SOU), Dvořákova 19, 669 02 **Znojmo**.

### Program:

pátek 13.10. od 16 hodin prezence účastníků, ubytování  
večeře (studená), beseda s účastníky UK v Tel Avivu

sobota 14.10. 8,00 snídaně  
9,00 zahájení konference, pracovní jednání  
12,00-13,00 přestávka  
13,00-17,00 pokračování konference  
18,00-19,00 večeře  
19,00-23,00 zábavný večer s tombolou

neděle 15.10. 9,00 snídaně (současně bude vydán studený oběd)  
10,00 turistický program - vycházka historickou částí Znojma

### Účastnický poplatek:

člen ČES - při platbě do 20.9. 2000 - 150 Kč, po tomto termínu 250 Kč

(členem ČES se zde rozumí člen v kategorii F - doživotní, nebo členové v kategoriích A, B, D a E - za předpokladu, že mají uhrazeny členské příspěvky na rok 2000 nejpozději v den zahájení konference)

nečlen ČES - při platbě do 20.9. 2000 - 250 Kč, po tomto termínu 350 Kč

zvláštní poplatek pro mládež do 30 let a nevidomé členy ČES - do 20.9. 2000 bez poplatku, po tomto termínu 150 Kč.

čestní členové ČES a čestní hosté bez poplatku

Strava - 2x plná penze, začíná páteční večeří a končí nedělním obědem -  
360 Kč/osoba, nebo 2x oběd a 2x večeře (bez snídaní) - 280 Kč

Ubytování - v Domově mládeže, 2 noci: 300 Kč

### Popis cesty k místu konání konference:

pěšky - cca 20-30 minut - z nádraží ČD (autobusové nádraží je hned vedle) - ulicí 17.listopadu, na Mariánském nám. přechod přes silnici vlevo, na ulici Studentskou, nám. Komenského, pokračovat přes Husovy sady k Městským lázním, dále chodníkem kolem parkoviště přejít na nám. Svobody k prodejně FIALA, pokračovat po chodníku k obchodu obuvi SCALIA na ulici Pražská (vlevo budova Úřadu práce a

Finančního úřadu), u obchodu odbočit vlevo ulicí Dr. Mareše, kterou se dojde k SOU - za zimním stadionem.

**autobus MHD** - jízdné 6 Kč se platí hotově řidiči - linka č.1 směr Hradiště, č.3 Pražská, č.4 Přimětice (Nová nemocnice) - vystoupit na druhé zastávce u Městských lázní a pokračovat přes náměstí Svobody podél hlavní silnice na Prahu, Jihlavu - u prodejny Crystal a Gorenje přejít na druhou stranu a ulicí Dr. Mareše k učilišti. Po 18,30 hodině jezdí jen linka č.6 směr Přimětice - rovněž vystoupit na druhé zastávce u lázní.

**automobilem** - příjezd od Jihlavy po ulici Pražská odbočit doprava na ulici Dr. Mareše, po přejetí druhé světelné signalizace před obchodem obuví SCALIA, příjezd od Brna městem po hlavní silnici směr Praha, Jihlava - kolem Městských lázní, na ulici Pražská - vlevo míjí Úřad práce a Finanční úřad (Bílý dům), u obchodu SCALIA odbočit vlevo ulicí Dr. Mareše k učilišti.

V pátek 13. 10. 2000 bude na vlakovém nádraží fungovat naše informační služba.

Během konference budete mít možnost zakoupit esperantské zboží v Libroservu ČES. Libroservo bude na konferenci výhradním prodejcem, pokud si přejete nabídnout k prodeji svoje E-předměty, pak pouze jeho prostřednictvím. Neesperantské zboží nebude dovoleno prodávat.

Vkládání reklamních materiálů do tašek pro účastníky a jakákoliv další propagační činnost jsou možné po předchozí dohodě s výborem ČES.

Taktéž budete moci na místě zaplatit členské příspěvky ČES, UEA a předplatné esperantských časopisů.

Úhrada účastnického poplatku je možná těmito způsoby:

- a) složením příslušné sumy v kterékoliv pobočce Komerční banky a.s. na konto ČES č. **3330-021/0100**, variabilní symbol **10007**, konstatní symbol **0308**. Nezapomeňte na složném lístku uvést své jméno a příjmení. Vklad je bez poplatku.
- b) bezhotovostním převodem z Vašeho účtu - nezapomeňte uvést v.s. a k.s.
- c) na vyžádání Vám pošleme složenku. Vyplňte prosím čitelně, úplně a černou propisovačkou (nebo tenkým černým fixem). Poplatek dle poštovních tarifů.

**Příhlášky** posílejte pokud možno **do 20. září 2000** (rozhoduje datum poštovního razítka) na adresu **Český esperantský svaz, 7.konference ČES, pošt. sch. 1069, 111 21 Praha 1.**

Stornovací poplatky: při odhlášení do 3. října 2000 (dle poštovního razítka) Vám bude odečteno 10% ze zaplacené částky na nezbytné náklady, po tomto termínu 50%.

Těšíme se na shledanou ve Znojmě.

Věra Podhradská, v.r.  
předsedkyně ČES

## Závazná přihláška na 7. konferenci ČES

Znojmo, 13.-15. října 2000

Příjmení:	Jméno :	Titul:
Adresa vč.PSC:		
telefon vč.předčíslí:		E-mail:
rodné číslo:	číslo OP (pro ubytování):	
číslo člen.průkazu ČES:	vegetarián <input type="checkbox"/> ano <input type="checkbox"/> ne	

Přihlašuji se závazně na 7. konferenci ČES. Prohlašuji, že jsem si pozorně přečetl/a/ pozvánku a souhlasím s podmínkami pořadatele. **Objednávku služeb uvádím na rubu této přihlášky.**

Způsob úhrady (zakřížkujte jednu možnost):

- složeno v Komerční bance a.s. dne.....
- uhrazeno bezhotovostně a mého účtu číslo ..... dne.....
- pošlete mi složenku na úhradu poštou

**Objednávám následující:**

(zakřížkujte žádané)

**Kompletní služby** - 2x nocleh, 2x plná penze - Kč 660,-  ano  ne

**Stravu bez ubytování** -2x oběd, 2x večeře - Kč 280,-  ano  ne  
*(pro místní účastníky a ubytované mimo domov mládeže)*

**Účastnický poplatek**

člen ČES, platba do 20.9. Kč 150,-  ano  ne

po 20.9. Kč 250,-  ano  ne

zvýhodněný poplatek do 20.9. - zdarma  ano  ne

po 20.9. Kč 150,-  ano  ne

nečlen ČES , platba do 20.9. Kč 250,-  ano  ne

po 20.9. Kč 350,-  ano  ne

Dar svazu.....Kč.....

Celkem k úhradě.....Kč.....

Poznámka.....

Datum.....

Podpis.....



## PARAZITOJ DE DOMBESTOJ

Antaŭ ol ni parolos pri parazitoj de dombestoj, ni difinos la nocion "parazito". Kio estas parazito?

Parazito estas organismo vivanta por malutilo de alia organismo. Vivciklo de parazito dependas de gastiganto.

Rilatoj inter parazitoj kaj gastigantoj estas tre malnovaj. Ni supozas, ke jam unuaj senvertebruloj havis siajn parazitojn. Unuaj birdoj aperis en mezozoiko. Unuaj mambestoj aperis en fino de mezozoiko. Birdoj kaj mambestoj progresis precipe en kenozoiko kaj iliaj parazitoj evoluis kun ili. Kelkaj parazitoj atakis internajn organojn de siaj gastigantoj, dum aliaj koncentriĝis je surfacoj de korpoj.

Rilatoj inter parazitoj kaj iliaj gastigantoj iĝis pli intensaj en glaciepoko. Parazitoj povis supervivi fridan klimaton pli facile en terkavoj kaj nestoj de vertebruloj.

Unuaj mambestoj aperis antaŭ proksimume ducent milionoj da jaroj, sed homo aperis antaŭ nur du milionoj da jaroj. Plimulto de parazitoj estis ankoraŭ adaptita je animaloj. Ĝuste pro tio plimulto de parazitoj de bestoj ne atakas homojn. Ekzemple kuniklo havas dek kvar speciojn de protozoaj parazitoj, sed ili ne atakas homojn. Sarkopto *Sarcoptes scabiei* kaŭzanta skabion ne ofte atakas homojn. Ankaŭ cimoj kaj pedikoj de animaloj ne ofte atakas homojn. Kontraŭe

homlaŭso, parazito de homoj, ne atakas animalojn. Kelkaj parazitoj, ekzemple kuloj kaj puloj, povas ataki bestojn kaj homojn.

Ni ne havas tempon paroli pri multaj parazitoj kaj iliaj vivcikloj. Ni parolos nur pri la plej danĝeraj parazitoj de dombestoj, kiuj krom bestoj atakas ankaŭ homojn.

1. **BALANTIDIO** estas parazita protozoo, cilioforo. Unu ĉelo de balantidio faras ĉiujn vivfunkciojn: movadon, spiradon, digeston, sekreциadon kaj reproduktion. Balantidio havas grandan kaj malgrandan nukleojn, ĉelan buŝon, vakuolojn kun amilopektino kaj vakuolon de sekreциado. La tuta supraĵo de ĉelo estas kovrita per multaj cilioj. Balantidio parazitigas en dika intesto kaj cekumo de porko kaj apro. Ĉi tiu parazito ofte ne faras malsanon, sed iufoje ĝi penetras instestan mukozon farante inflamojn kun ĥronika diareo. Balantidio kreas cistojn kaj transvivas en ili malfavorajn vivkondiĉojn. Cistoj estas eligataj en fekaĵoj. Porkoj, aproj kaj homoj povas infektigi, se ili englutus la cistojn.

Balantidiozo estas ĥronika malsano de buĉistoj, porkobredantoj, bestkuracistoj kaj bestkuracistaj teknikistoj, se ili ne lavas la manojn.

Prevento estas simpla: bona higieno.

*Oldřich A. Fischer*  
(lingve kontrolis J. Kavka)

**balantidio** vakovka stěvní (*Balantidium coli*), **cilioforo** obrvený nálevník, **kenozoiko** třetíhory, **mezozoiko** druhohory, **sarkopto** zákožka, **skabio** svrab.

Jiří Kořínek

## NI KREU KOMPLETAN VORTARON

*La suba artikolo aperis en Internacia Kulturo 1/1949 en Bulgario kaj ebligas al ni ne nur rememori nian faman artiston, sed ankaŭ prikonsideri, kio realiĝis el liaj profetaĵoj kaj kion ni ankoraŭ faru.*

La ĉefartikolo el la plumo de la UEA-prezidanto en la lasta n-ro de "Esperanto" stimulas al serioza pripenso. Du punktoj en ĝi ŝajnas al mi tre gravaj: posedigi al nia movado sufiĉon da plenkapablaj Esperanto-instruistoj, laŭeble profesiaj pedagogoj kaj strebi al serioza uzado de Esperanto en ĉiuj gravaj branĉoj de la homa entreprenado. Jes, vasta kaj perfekta uzado de la lingvo ĉu por celoj praktikaj, ĉu idealaj estas la plej efika kaj potenca propagando.

Ĉar oni nun ĝenerale planas kaj starigas al si laborprogramojn por la plej urĝe farendaj taskoj, estas prudente, se ankaŭ ni, esperantistoj, forte streĉus nian ĉefan klopodon al certaj plej gravaj celoj. Pri unu eble plej grava mi volas ĉi tie atentigi.

Intencante uzi Esperanton por serioza laboro, egale, ĉu temas pri diversaj fakverkoj, artikoloj, resumoj aŭ pri eldono de prospektoj kaj prezaroj, koncize pri ekzakta apliko de Esperanto sur ĉiuj plej malsamaj kampoj, oni sentas egan bezonon de ampleksa kompleta oficiala vortaro. La skeleto de tia vortaro devus esti nia nuna Plena Vortaro de SAT, kiu bone solvas la eksplikmanieron

de ĉiu vorto, donante tuj uzekzemplojn, kaj kiu ĝis nun estas la sola grava helpilo por serioza lingvouzanto. Tamen laŭ la hodiaŭa stato de nia lingvo, laŭ la taskoj de ĝi estonte plenumotaj, estas la nuna Pl. Vortaro ege malkompleta. Estas vere, ke aperis ankaŭ jam aro da fakvortaroj pli malpli perfektaj, oficialaj kaj fidindaj, sed malmultaj ilin posedas, ili estis dise eldonitaj kaj estas hodiaŭ ne eble al la bezonanto havigi ilin al si. Pluraj estas delonge elĉerpitaj, aliaj malnoviĝintaj, modestegaj, apenaŭ tolerantaj la nomon "fakterminaro".

Kion ni do bezonus? Ni devas grand-skale kompletigi nian Plenan Vortaron unue per granda nombro de vortoj jam sufiĉe en la lingvo disvastigitaj, kiujn oni grandparte pro la ŝrumpinta amplekso de la projektita P. V. jam post ĝia kompilo ellasis; due per envicigo de ĉiuj ĝisnunaj fakterminaroj, submetante tiujn samtempe al zorgema kontrolo kaj revizio, kompletigo kaj modernigo; trie per kompilo de ankoraŭ ne ekzistantaj gravaj fakterminaroj; kvare, ĉi tie devus certe ne manki plej granda parto de novesprimoj, kiujn liveris al ni dum du jardekoj "Literatura Mondo", kiuj troviĝas en la Parnasa Gvidlibro. Ĉe tiu okazo mi volus atentigi, ke la sinonimoj por kelkaj tre ofte uzataj mal-kunmetaĵoj estis prudenta kaj la lingvoevoluo antaŭvidanta ideo. Ni vidas je vorto "fora", kiu jam tiel enradikiĝis (kvankam ne tre preciza solvo, ĉar ja forjeti neniel estas malproksimenĵeti), la preferon al kroma konciza dusilaba sinonimo, kiun pleje bezonas nia poezio.

Tamen ĉe tiaj esprimoj kiel "frida, lanta, dura, primavero" ktp. estus necese aldoni, ke ili restu en nia lingvo kiel esprimoj pli edifitaj, kiel sinonimoj pli "dimanĉaj", kiel tiajn cetere posedas la poezia lingvo de naciaj lingvoj, do ke oni ilin preferu ne uzi tro ĝenerale. Kvine, la vortaro enhavu oficialigitajn nomojn de ĉiuj landoj kaj loĝantoj, ke ne plu ekzistu paralele uzataj Egipto-Egiptujo, Brazilo-Brazilio, Irako-Irakujo ktp. Ekestu foje ordo. Oficialaj estu ambaŭ landsufiksoj -ujo kaj -io; ili ja pace toleros sin kaj estos finfine pliriĉigo de la lingvo; ĉe unusilabaj radikoj kompreneble eblas uzi vortkunmetaĵojn kun lando: Finnlando. Danlando k. s.

Fine oni zorgeme, kritike trakribu la kazojn de vortomismultiĝo, kie por unu nocia naskiĝis jam pluraj terminoj (Ekz. kavio-kobajo ktp.) dank' al la principo "vorton, kiun vi bezonas kaj ne trovas en vortaro (via), kreu mem". Ĉe evitendaj formoj oni prefere revenu al la formo oficialigita. Nome ĉe fakterminoj tia abundo de sinonimoj konfuzas kaj malutilas, same kiel ĉe lingvo poezia, beletra; lingvo artisme pentranta, la esprimriĉeco, nuanco aŭ elvokivo de vortoj kiel "kurta, olda" k.s. estos bonvena pliriĉigo.

Ideale estus, se oni povus kompletigi la klarigojn per ilustraĵoj. Ĉe esprimoj medicinaj, botanikaj k. s. helpos ree la apudmeto de la latina nomo. Teknikaj fakesprimoj malfacile klarigeblaj povus havi apud la konciza klarigó event. la nomon en 5 ĉefaj mondlingvoj (angla,

franca, rusa, germana, hispana).

Tia Kompleta Vortaro devus esti plej aŭtoritata, do eldonaĵo de la Esp. Akademio. Ĝi devus esti verko neniel mallarĝanima, ĝi devus respuguli nian hodiaŭan riĉan modernan Esperanton, atentante jam la bezonojn de l' morgaŭo, ĉar tia verko servus certe dum jardekoj kaj povus eble ricevi nur ĉiun trian jaron necesan komplementon. Ĝi estus granita fundamenta bloko de la moderna Esperanto, plej granda garantio por ĝia estonteco, plej grandioza konvinkilo kaj propagandilo. Ĝi estus rimedo, kiu kapablas gajni seriozulojn. Ĝi estus fidinda trezorujo, el kiu ĉerpis ĉiuj nacilingvaj-Esperantaj vortaroj, solida fundamento,

sur kiu oni povos bazi nian lingvon dum la venontaj 50 jaroj.

La amplekso de tiu ĉi vortaro estus proksimume sepoble pli granda ol la hodiaŭa Plena Vortaro, bindita en tri 1200-paĝajn volumojn. Papero bona, bindofortika, solida. En tiu ĉi amplekso ĝi ne estus ia leksikono, nek ĝi povus enhavi ĉiujn kompletajn fakterminarojn. Sed ĝi estus verko impona, por niaj cirkonstancoj preskaŭ nekredebla. Ĝia prezo estus eble dekoble pli alta ol la nuna Plena Vortaro kaj ĝin ne povus al si havigi tuj ĉiu esperantisto, por multaj ĝi estus por la komenco neakirebla sopirataĵo. Sed poiome ĝin ekposedus ĉiu serioza esperantisto. Oni povus ĝin subskribci, oni devus ĝin oferti al ĉiaj urbaj kaj altlernejaj bibliotekoj por atingi plej vastan distribuigon de la verko en la mondo.



Certe ŝajnas tiu ĉi tasko dum niaj nunaj interŝtataj baroj kaj devizaj malfacilaĵoj fantazia aŭ utopia. Sed ni konsideru jenon: tia por niaj cirkonstancoj grandega verko ne povus aperi morgaŭ. Ĝi estus kompila laboro de multaj fakuloj, komparantoj kaj kontrolantoj, de niaj ĉefaj lingvofakuloj por ne mallonga tempo. Eĉ se ni imagus foje vere intensegan laboron de niaj kompetentuloj pri tiu ĉi gravega vortaro, daŭrus 4-6 jarojn, ĝis kiam la verko estus preta. Dume devus komenciĝi granda reciproke konkura monokolektado por la "Vortara Fonduso". Ĉar ja por eldoni tian verkon estos vere granda sumo necesa. La kontribuantoj ne estus donacantoj en la plena senco de la vorto. Oni povus kvitancojn por sumoj en difinita alteco numeri, kaj poste lotumi. Venus aliaj ideoj, kiel aranĝi la aferon, ke povu partopreni samideanoj el la nepagipovaj landoj. Ĉesas la kolektado de peticioj por UNO. Nun povus aperi sur la paĝoj de Esperanto kaj niaj ceteraj gazetoj nova konkurtabelo, tiu de la "Vortara Fonduso". Ĝi fariĝus termometro de nia esperantista entuziasmo kaj oferemo - sed ankaŭ de nia prudento kaj antaŭvidemo! Se la afero efektiviĝus, mi komencante volas deponi el mia bonhavo aŭ nove enpagi ĉe la Esperanto-Asocio de ĈSR la unuan subskripcion de 2000 ĉeĥosl. kronoj kaj la unuan donacon por la "Vortara Fonduso" de 100 ĉs. kr. Kiuj sekvos?

*Kio efektiviĝis el la imagoj de Jiří*

*Kořínek? En 1970 aperis Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, 1300-paĝa. Ĝi grandparte plenumas la postulojn de Kořínek, kvankam ĝi estas nur unuvoluma kaj neoficiala, tamen ĝuas aŭtoritaton de kvazaŭ oficiala verko. En 1999 d-ro Erich-Dieter Krause eldonis Esperantan-Germanan vortaron, kiu estas la unua Esperanta-nacia vortaro, kompareble kun PIV, enhavanta eĉ pli multe da vortradikoj. Nun ne plu estas nereale prepari similajn vortarojn ankaŭ en aliaj lingvoj, ĉar komputiloj ebligas ne nur pli facilan kaj pli rapidan laboron, sed ankaŭ malmultekostan eldonon en elektronika formo. Do dependas nur de nia diligento, ĉu aperos simila vortaro ankaŭ en la ĉeĥa.*

## **Eŭropa jaro de lingvoj 2001**

La venonta jaro estos verŝajne proklamita Eŭropa jaro de lingvoj por subteni instruadon de malgrandaj kaj minoritataj lingvoj, por savi ilian kulturon kaj literaturon. Celu estas, ke ĉiu civitano de Eŭropo konu krom sia gepatra lingvo almenaŭ du fremdajn, nome unu mondan (kutime la anglan) kaj unu de iu malgranda nacio. Okazos programoj por realigo de la ideo, eĉ konkursoj pri plej efikaj interkulturaj edukaj programoj. Ekzistas naciaj komitatoj komisiitaj gvidi la aranĝon en ĉiu lando.

Nia movado intencas prezenti la projekton *Kvazaŭlernejo Tibor Sekelj* en la reto, kiel edukilon de lernantoj al reciproka interkonado de siaj kontinentoj, landoj, historioj kaj kulturoj. Planataj estas ankaŭ renkontiĝoj de 15-18-jaruloj en Strasburgo kaj aliloke.

## Konferenco de AIS San Marino en Hradec Králové

Pentekoste, inter 2000-06-09 kaj 2000-06-13, la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino okazigis sian 23-an Sanmarinecan Universitatan Semajnon (SUS 23) en la orientĉeĥa urbo Hradec Králové. Okazis kursoj pri astronomio, lingvistiko, kibernetiko, matematiko kaj sociologio, kaj pluraj sciencaj prelegoj. La Internacia Lingvo Esperanto estis la nura kurslingvo kaj unu el la preleglingvoj. La plej aĝa partoprenanto estis loka esperantisto 89-jara, kiu lernis la lingvon antaŭ 70 jaroj; li kompreneble partoprenis ne por ekzameniĝi, sed nur pro intereso.

Rande de la konferenco okazis kunveno de TAKIS (Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko), kiu decidis ŝanĝi sian strukturon pro la dissolviĝo de AIC, la Internacia Asocio pri Kibernetiko. AIC ĝis nun uzis tri lingvojn: La Anglan, Francan kaj Internacian; TAKIS estonte uzos krom la Internacia la Anglan kaj la Germanan, kiel la lingvojn de Shannon kaj Schmidt, la patroj de la kibernetiko. Krome dumtempe ĝi uzos la lingvon de sia venonta kongresloko kaj la gepatrajn lingvojn de po pli ol triono de la membraro. La kunveno akceptis inviton de la universitato de Nitra (Slovakio), okazigi TAKIS-kongreson en somero 2002. Samtempe okazu AIS-studadsesio.

La sekva SUS komenciĝos je vendredo, 2000-09-22, en la Rumana urbo Sibiu kaj daŭros unu semajnon. Ĝi atendas plurajn finekzamenajn kandidatojn por akiro de scienca grado. Detaloj estas scieblaj de: Mag. Joanna Lewoc, Senata Sekretario de AIS, Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, DE-37077 Göttingen, Germanio, TTT: <http://www.forst.tu-muenchen.de/OTHE RS/AIS/>

\*

Parte paralele al SUS okazis PKKP 8. la 8a "Praga Konferenco pri Kibernetika Pedagogio", scienca konferenco pri instrukaj lerneteknologio kaj similaj temoj. PKKP uzis ne nur Esperanton, sed ankaŭ la lingvojn Ĉeĥan, Slovakian, Anglan kaj Germanan. Tamen nur dum la solenaĵoj kaj la plenkunsidoj okazis tradukado; en la unuopaj sesioj estis la regulo, ke ĉiu preleganto antaŭe disponigu skriban tekston en almenaŭ unu alia lingvo ol la preleglingvo, tiel ke ĉiu komprenu almenaŭ parton de la prelegoj.

Tio estas interesa principo, kiun bedaŭrinde ne ĉiuj prelegantoj sekvis. La organizantoj de la sekva PKKP, kiu okazu en 2002 en la najbara lando Slovakio, intencas pli strikte insisti pri la apliko de tiu principo. Kune kun PKKP 9 okazu ankaŭ kongreso de TAKIS (Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko). La jubilea konferenco PKKP 10 okazu post kvar jaroj denove en Hradec Králové; la vicdekano de la loka fakultato dum solena akcepto kore invitis al tio.

*interredaktore + R. Fössmeier*

## DON KIĤOTO INTER NI

(memore al Jiří Karen)

Kiam oni oficiale esprimos la kondolencon pro ies morto, ni ekkomencos tute nature demandi, "kion li/ŝi faris por Esperanto". Kvankam ni tiel plendas, ke... tamen oni povas konstati, ke "paŝo post paŝo". . .

Same estas rilate al Jiří Karen (propranome Ladislav Podmele). El multaj paŝoj, kiujn li faris, por ke nia movado progresu, mi elektas nur tiun, kiu montras, kiel li propagis "nian aferon" inter ĉeĥaj verkistoj, kaj entute inter la ĉeĥa legantaro.

Se la sekvontajn liniojn vi opinios konataj, eĉ enuigaj, ne forgesu, ke li parolis al la homoj el tute alia, precipe opozicia sfero. Same - konsciiĝu dum la legado, ke lia parolo estis klara: jes-jes, ne-ne. Tiel paroladis nia kara amiko Jiří KAREN - esperantisto - demokrato - kristano. Ĉu li faris bonajn paŝojn, montros venontaj rilatoj de ĉeĥaj redaktoroj kaj de iliaj legantoj al Esperanto. Vi ĉiuj almenaŭ komprenu, kial la heroo de lia lasta verko (li ne ĝisvivis ĝian aperon) nomiĝas Don Kihoto...

*Margit Turková*

Jiří Karen

### Nek utopio nek ludilo

*Ĉi tiun artikolon verkis Jiří Karen al ĉeĥaj verkistoj, en la gazeto Obrys-KMEN.*

Kiel la internacian lingvon multaj homoj opinias la anglan. Certe, ĝi estas nepre bezonata en tekniko, en la sciencaj sferoj, en sportado. "Lernu la anglan kaj antaŭ vi estas malfermita la vojo al vivkariero". Kaj la plej multa parto de la

homaro strebas nur pri la kariero, la profito, la mono. Ĉu vere?

Se vi komencas paroli pri la monopolo de la angla lingvo ekzemple kun franco, vi trovos barieron. La francoj eĉ eldonis la leĝon, ke en la reklamo oni ne povas uzadi la anglajn esprimojn, se ekzistas ekvivalentoj en la franca.

Aserto, ke la angla estas lingvo facila, estas eraro. La gramatikon oni povas sufiĉe facile ekregi, sed ekregi la lingvon tiamaniere, kiel ĝin regas la homoj, kiuj naskiĝis en ties signo, estas preskaŭ malebla. Regi la lingvon, tio signifas legi, kompreni la paroladon, skribi senerare, esti kapabla parkere oratori, kaj precipe en la lingvo **pensi kaj krei**.

Mi ne estas kontraŭ studado de la angla. Male. Sed ni ne diru, ke pere de la angla estas la problemo de la internacia kompreno solvita.

La lingvo internacia (do E) havas, kontraŭe al ia ajn nacia lingvo, multe da avantaĝoj: oni povas ĝin ekkoni pere de memstuda (memdidakta) metodo. Pere de kompara instruado montriĝis, ke ĝi estas 5-foje pli facila, ol kia ajn nacia lingvo. La vort- kaj gramatika strukturo de la internacia lingvo estas farita surbaze de l' komparo de naciaj lingvoj. Estis akceptita ĉio, kio estas ĝenerale komprenebla al homoj, kiuj kapablas regi la fremdan lingvon de certa vort-familio. Kiu komencos kun la internacia lingvo, do ĉion, kion li/ŝi eklernis, trovos en aliaj lingvoj. Kiu konas aliajn lingvojn, komprenas tekston en la internacia lingvo.

La internacia lingvo estas pli multe, ol nur la komunikado. Ĝi ankaŭ estas ligilo inter homoj de diversaj rasoj kaj nacioj. Ĝi edukas al tutmondiĝa civitaneco (al sento de tutmonda civitaneco), al kapablo kompreni ĉion, kion ni havas *komuna*. Koni ĉi tiun lingvon estas praktika afero: ekzemple UEA eldonadas regule jarlibrojn. Tiuj enhavas ĉirkaŭ 2000 adresojn de esperantistoj, kiuj estas bonvolaj ĉiun, kiu vizitas ilian landon, informi pri la malmultekosta loĝado kaj nutrado, liveri al (i)li gvidservojn, inviti (i)lin en familian rondon, en E-klubon, k.s. Certe vi akceptas, ke tio estas bonuzebla metodo ne nur por studentoj kaj pensiuloj. Ĉiu vera turisto ne nur rigardas, sed li eniras la landon pere de vivaj, spontanaj kontaktoj.

La aŭtoro, skribanta en la internacia lingvo, havas ja internacian publikon. Ne kreu, ke la internacia lingvo estas malperfekta, ke ĝi estas utopio. La lingvo funkcias kaj paŝas antaŭen. La malamikeco kontraŭ ĝi ekstaradas el finacionalismo kaj ŝovinismo. Do el la reĝimoj, kiuj timas kontaktadon eĉ inter la popoloj; ĝin timas ĉiuj, kiuj faris por si profiton komercan el edukado de la angla.

En la jaro 1996 okazis en Prago internacia kongreso de esperantistoj. Filozofoj, sciencistoj kaj verkistoj povis ĉi tie, kaj dum aliaj kongresoj, trovi propran formon kiel publikigi siajn ideojn. La dubantoj povas konvinkigi, ke la lingvo funkcias en ĉiuj aferoj de la homa agado. Oni ludas teatron, oni

kantas, oni prezentadas prelegojn pri diversaj seriozaj kaj interesaj temoj. La internacia lingvo estas vere tralaborita en ĉiuj stil-niveletoj: de la lingvo vulgara ĝis la lingvo en sferoj scienc-teknikaj kaj poetaj. (La verkistoj povas partopreni internaciajn konkursojn.)

La Esperanto-eldonejo KAVA-PECH (Anglická 878, 252 29 Dobřichovice) volonte sendos al vi liston de la eldonita literaturo. Nur kiel ekzemplojn mi elektas: Ĉapek: Milito kontraŭ salamandroj  
Hašek: Ne nur soldato Ŝvejk  
Kožík: La plej granda el pierotoj  
Same kiel la antologio de 52 niaj (do ĉeĥaj) poetoj en 1000 versoj, kiuj troviĝas pararele (ĉeĥe-esperante) en la traduko de Jos. Rumler.

En la signifa Esperanto-eldonejo Fonto en Brazilio aperis vasta aŭtobiografia romano de ĉeĥa esperantista poetino Eli Urbanová *Hetajro dancas*, kaj elekto el poeziaĵoj de Jiří Karen *Flugilhava ŝtono*. En Germanio eldoniĝas la kompleta verkaro de Karolo Piĉ, kaj la aŭtoro mem estas ofte komparata, en skribstilo, kun la fama verkisto Bohumil Hrabal.

Kiam ankaŭ via verko aperos en la lingvo Esperanto??! Interesiĝu pri Esperanto, la esperantistaro interesiĝos pri vi...

La **Interlingvistikaj studoj** en Poznan denove startos ekde septembro. Mezlernejoj povas aliĝi (350 PLZ) ĉe d-ino Ilona Koutny, Lingvistika Instituto de UAM, ul. Miedzzychodzka 3-5.

PL-60-371 Poznan, T/F: 61 8618-572

## E-MENTAL'

klubo pro homoj E-pozitivaj

La agado oficiale startigita 5.5.1998. Al inaŭguro invitita sepdeko da esperantistoj - eksjunularo - el Prago, venis nur 11 + 3 infanoj, tamen la komenco estis sukcesa. La klubo post kelkaj monatoj ŝanĝiĝis al ŝtato (24.11.1998), ŝtato maldemokratia kun forta diktaturo frunte kun diktatorino, kiu post pruvo de siaj kvalitoj enkondukis ipsilonon en sian titolon.

Ĉiu civitano E-parolanta estas ministro, E-neparolanta ĉefoficisto, la eksterpraganoj iĝas ambasadoroj kaj eksterlandanoj eĉ superambasadoroj.

### Funkcioj:

dyktatorino

ĉefministro

ministro de ekstermentalaj aferoj, de edukado kaj recidivo

ministro de medicino kaj okultismo

ministro de financoj kaj fitrompoj

ministro de pasinteco kaj estonteco

ministro de kulturoj kaj katastrofoj

ministro de informadiko, komunikado kaj demagogio

ministro de propagando kaj kontaktoj kun la animala regno

ministro de trafiko kaj karamboloj

ministro de sekureco kaj malsekureco

ministro sen portfolio

ministro de ĉiokontrolado

ministro de la arbara kaj cetera bestaro

ministro de la defendado de Esperanto

ministro de la laboro kaj de la pigrado

ministro por la suno, pluvo kaj ventoj

ministro por nenio

ministro por promiloj en sango

prezidantino de l' oficejo por kontaktado

prezidantino de l' oficejo por kreskigado de la apetito

prezidanto por la nuklea energio, kalorioj kaj juloj

ambasadoro por Nespeky kaj la tuta baseno de la rivero Sázava

ambasadoro por Mladá Boleslav kaj la senpera ĉirkaŭaĵo

ambasadorino por Brno kaj la senpera ĉirkaŭaĵo

superambasadorino por Slovakio

superambasadoro por Kroatio

+ *proksimume 5 infanoj, provizore sen sunkcioj*

La kunvenoj realiĝas unufoje dum du semajnoj, eventuale post 14 tagoj. Laŭ la temo, balotata ĉiam fine de kunveno (ĉiu skribas proponon sur papereton kaj tiun metas en temujon) oni preparas programon por la venonta kunveno. Jam estis jenaj temoj: Israelo, fromaĝoj, Ameriko, sopiro vojaĝi, Oriento, afrodiziakoj, simioj..... kun gustumado de koncernaj specialaĵoj: Gorila lakto, La hepataĵo laŭ araba maniero, Oranĝa saŭco, Citronŝelo, Kuniklo sur slivovico, Flugiloj laŭ meksikia maniero.

Lasta aranĝo:

23.6. Netolice - eminenta amatora teatraĵo *Obstina virino*.

24.6. vizito de kastelo Kratochvíle, ĉevaltrafiko en Ĉ. Budějovice, vespere rostado de viando kaj cervelasoj en Tomeček-kabano en Chotýčany.

*Vlasta Pištíková  
pismis@volny.cz*



## Proč sekce informatiky..?

Esperanto (jazyk i hnutí) má na to, aby napomáhalo rychlému rozvoji lidského vědění. Ovšem bez schopností využívat současných technických vymožeností (počítače, internet....) a lidí schopných s těmito prostředky přínosně pracovat by to asi nešlo dost dobře.

Zatím existovala VTS sekce. Ta už se tuším přežila a nemohla ani svým členům, ani svazu a troufnu si tvrdit, že ani celému hnutí nic nového dát. Tím nechci říci, že by VTS byla nějaká VeTeŠ, jak se jí familierně říkalo koncem 80. let v jednom známém podniku. Proto byla založena v rámci ČES sekce informatiky, která by měla všem zájemcům (ať už schopným odborníkům, kteří tvořili sekci VTS, nebo do této chvíle nevyužitým pro ČES, tak i laikům mého typu) vytvářet podmínky pro co nejúčinnější využívání možností, které nám dávají moderní technologie v oblasti informatiky. Dokonce se odvážím prohlásit, že tato sekce by se měla v nejbližší době stát organizační pravou rukou výboru ČES.

Prosím tedy všechny zájemce i pouhé zvědavce, aby se neostýchali zapojit do činnosti této sekce a psali, nebo telefonovali mně jako členu výboru zodpovědnému za činnost sekcí.

Jan Řepa  
Na Valše 250  
384 11 Netolice

tel. 0338/324 552 (domů p6 19 hod),  
0338/ 324 287 (práce), 0602 800 214  
(mobil).

## LIBROSERVO ČES

získalo za velmi výhodnou cenu omezený počet níže uvedených nových knížek:

### 3.26+ G. Pausewang: La lastaj infanoj de Oldrovalo

Romano-fikcio pri la mondo post pereiga mondmilito. Emocia kontraŭmilita kaj porpaca libreto tradukita el la germana Esperanten de J. Giessner

(57,- Kč)

### 3.27+ Astrid Lindgren: La Fratoj Leonkoro

Originaleca fabelo de la aŭtorino pri bono kaj malbono plena de poezio. La fabelo povanta ion diri ne nur al infanoj, sed ankaŭ al plenkreskuloj. El la sveda tradukis K. Rohdin, ilustris I. Wikland

(95,- Kč)

Po dohodě s p. J. Giessnerem, od kterého máme uvedené zboží v komisním prodeji, došlo k **výraznému snížení cen následujících nosičů zvukového záznamu od 01.06.2000:**

### 8.02+ KA: Famaj kantoj por belaj horoj

(stará cena 140,- Kč) (nová 57,- Kč)

### 8.03+ KA: Kantoj de l' popolo

(stará cena 85,- Kč) (nová 57,- Kč)

### 8.04+ CD: Kantoj de l' popolo

(stará cena 170,- Kč) (nová 115,- Kč)

Na Vaše objednávky se těšíme na známé adrese:

**Český esperantský svaz, Libroservo,  
pošt. příhr. 1069, 111 21 Praha 1**

### **POZOR - DŮLEŽITÉ !!!**

Vážení přátelé,

věnujte prosím pozornost adresnímu štítku na tomto Startu - na každém najdete svou adresu a číslo legitimace. Nejste-li čestným nebo doživotním členem ČES, pak se na štítku tiskne ještě **dvojciferné číslo vyjadřující rok, na který nám od Vás došel členský příspěvek** - konkrétně "00" je platba na rok 2000.

**Pokud vidíte na štítku jiné číslo než 00,** pak s Vašimi příspěvky je něco v nepořádku. Možná jste zapoměli příspěvky uhradit, nebo jste na složenku nenapsali svou adresu vůbec či použili k vyplnění jinou než černou barvou. Pokud jste peníze skládali v Komerční bance nebo převáděli z jiného účtu - uvedli jste své jméno?

#### **CO DĚLAT?**

**V případě, že jste příspěvek dosud neuhradil(a) příspěvky na rok 2000,** navštivte poštu nebo banku a udělejte to. Při vyplňování údajů se prosím držte pravidel, které jsem Vám poslala se složenkou. Víím, že přechod na nový způsob plateb je obtížný, ale jinak nelze. Česká pošta poukázky typ A zrušila a místo nich zavedla typ A-V, který vyhovuje modernímu způsobu zpracování peněžních operací, ale vyžaduje přesnost při vyplňování.

**Pokud jste již příspěvky uhradil (a),** ale k nám nedošly, pojďte společně hledat příčinu problému. Pošlete mi prosím na adresu svazu jakýkoliv doklad, podle kterého budu moci platbu dohledat a správně zařadit - např. podací lístek, složní lístek z banky, příkaz k úhradě (stačí kopie).

**Příští číslo Starta již budeme expedovat pouzám za spolupráci. e těm členům, kteří mají příspěvky na r.2000 v pořádku.**

Děkují Vám za spolupráci.

*Květa Krajičková*

### **Dotazy ohledně svazových záležitostí**

Všichni funkcionáři pracují doma, jejich rodinní příslušníci však ne vždy vítají, pokud členové svazu telefonují do jejich soukromého bytu jako do svazové kanceláře (**náš svaz žádnou kancelář nemá**), navíc často v nevhodnou dobu. Pokud funkcionáři v záhlaví Starta nevedli svůj telefon, respektujte soukromí jejich rodiny a telefonické dotazy adresujte na předsedkyni svazu (Věra Podhradská, tel. 05/4323 3047) nebo na ty funkcionáře, kteří svůj telefon zveřejnili.

### **Zasedání v Netolicích**

O víkendu 24/25.6.2000 se v Netolicích konalo zasedání výboru ČES, zabývající se hlavně přípravou říjnové konference svazu ve Znojmě. Na zahradě nedalekého zámku Kratochvíle shlédl výbor ochotnické představení Tylovy *Tvrdohlavé ženy*, ve které roli Zlatohlava ztvárnil náš místopředseda Jan Řepa.

Souběžně s výborem se v Netolicích sešla i dvacítká tzv. e-mentálů, kteří se scházejí na různých místech republiky dvakrát do měsíce, aby si dokázali, že esperanto může být i legrace. Tvrdohlavou ženu viděli o den dříve, navštívili i oslavu koněspřežky v Budějovicích a na chatě v Chotýčanech grilovali o sto šest.

## KALENDARO 2000

**aprilo-decembro** Výstava Esperantem k mezinárodnímu dorozumění ve Státním okresním archívu Znojmo, Divišovo nám. 5, návštěvní dny: pondělí a středa.

2.7.-12.8. 48-a SET Lančov

17.31.7. Skolta tendaro apud Chrudim

22.-29.7. Katolika E-Tendaro Sebrnice

24.7-3.8 UK Tel-Aviv

13.8. Renkonto de ekstendaranoj Lančov

1.-3.9. Jarkonferenco de la ĉeĥa IFEF-sekcio

16.9. E-Tago Pardubice

29.9.-1.10. Internacia Kultura Festivalo Ústí nL

30.9. Lanškroun-Králfky renkonto de EK-oj

**13.-15.10. Konferenco de ĈEA en Znojmo**

22-29.10. Lingva seminario Skokovy

**novembro** Polička

10-13.11. Kolokvo pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, temo: ekonomio. Kava-Peĥ. Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

**decembro** Paroliga Kurso kun Nikolaa Vespero en Dobřichovice

9.12. 17a Ĉeĥa-Saksa tago en Ústí nL

9.12. Rememoro pri Zamenhof, Písek

13.12. Beseda o Zamenhofovi. EK Přerov

16.12. Zamenhof-festo Vieno - ekskurso IFEF

31.12. (?) Esperanto-Silvestro - Česká Třebová

## Jak platit svazu

Variabilní symboly pro platby ČES

311YYXX úhrada expedice Libroserva (YYXX doplněno vedoucím Libroserva)

6043 předplatné Starto bez členství v ČES

0668 dary svazu

6940 členské příspěvky ČES

6941 členské příspěvky UEA

50100 sekce mládeže

50200 sekce šachistů

50400 sekce pedagogická (včetně ILEI-IPR)

60xxx subkonta klubů (koncové číslo pro každý klub odlišné)

80200 ediční fond

80300 propagace E-a v regionálním tisku

80400 fond Tilio

80500 ediční fond Anny Milatové

10007 7. konference ČES Znojmo, 2000

80500 Ediční fond Anny Milatové

Variabilní symbol je nezbytný pro správné určení a zaúčtování platby. Při jeho vpisování do příslušné rubriky poštovní poukázky doplňte zprava nulami. Pro vypisování poštovních poukázek typu A-V použijte psací stroj nebo černou propisovací tužku (event. černý tenký popisovač). Poukázku čitelně vyplňte v obou dílech, nezapomeňte na rubriku odesílatel. Na těchto poukázkách byla zrušena *Zpráva pro příjemce*, nelze tedy vpisovat žádná sdělení.

Platby s použitím příslušného variabilního symbolu můžete též provést složením hotovosti v kterékoliv pobočce Komerční banky a.s. na svazový účet č. 3330-021/0100, konst. symbol 0379. Vždy uveďte v příslušné rubrice jméno složitele - tedy jméno svoje, případně osoby, jejímž jménem platbu provádíte. Jednotlivci uvedou příjmení a místo bydliště (NOVÁK PŘEROV), kluby zkratku "EK" a sídlo (EK PŘEROV). Zásadně prosím **nevyplňujte celý název**, např. Klub esperantistů, místní pobočka ..., na výpisu se nám pak objeví omezený počet znaků - *Klub esperantist*, při cca 50 klubech v ČR je pak obtížné a často nemožné zjistit odesílatele.

Pro platby bankou ze svého účtu na účet svazu postupujte obvyklým způsobem.

## JAZYKOVÁ PORADNA

Na internetové stránce Starta jsme otevřeli jazykovou poradnu pro české esperantisty: [www.clavis.cz/starto](http://www.clavis.cz/starto).

Odesílatel:

Český esperantský svaz  
ESPERANTO, p. s. 1069  
111 21 Praha 1  
**Internet:** cea @ tnet. cz  
www.kuk.cz/cea/  
☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (31. ročník)  
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto  
Členská evidence a změny adres: Květa Krajíčková, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (31-a jarkolekto)  
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio  
Abonprezo: 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)  
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio, e-mail: starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto  
Presis: OPATISK Opava

Podávání novinových zásilek povoleno  
Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,  
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

ISSN 1212-009X

# NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno v hotovosti  
u pošty 746 01 Opava 1